

Johann Wolfgang von Goethe,
Super montoj regas kviet'

tradukita de Poul Thorsen

Super montoj
regas kviet',
tra l' foliaro
nur ventet'
spiras kun trem'.
Birdoj arbare silentas,
se vi atendas,
pacas vi mem.

*Traduko de la Germana poemo "Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de POUL THORSEN (*1915-01-07 - †2006-01-30).*

Arg-356-708 (2010-05-28
21:34:24)

Poul Thorsen estis dana Esperantista poeto, kiu verkis multajn originalajn kaj tradukitajn poeziaĵojn en la Internacia Lingvo. Vidu ankaŭ: <http://www.poulthorsen.dk/> kaj <http://www.liberafolio.org/2006/forpasis-poul-thorsen/view>.

Johann Wolfgang von Goethe,
Same tiel

tradukita de Richard Schulz

Super ĉiuj montoj
Trankvil',
Kaj ĉiuj fontoj
Sen babil';
Aŭdas vi ne
Birdetan ĉirpon arbare.
Pensu prepare
Pri la pere'!

*Traduko de la Germana poemo "Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (Rikardo Ŝulco, *1906-07-12 - †1997-09-26).*

Arg-356-706 (2013-02-26
15:16:30)

Tiu Esperantigo aperis komence de la okdekaj jaroj de la 20a jarcento en la "Vestfaliaj Flugfolioj", kiuj eldonis Rikardo Ŝulco (Richard Schulz), honora membro de Germana Esperanto-Asocio. Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz. Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz.

Johann Wolfgang von Goethe,
Из Гёте

tradukita de Михаил Лермонтов

Горные вершины
Спят во тьме ночной;
Тихие долины -
Полны свежей мглой;
Не пылит дорога,
Не дрожат листья ...
Подожди немного,
Отдохнешь и ты.

*Traduko de la Germana poemo "Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22) en la Rusan de МИХАИЛ ЛЕРМОНТОВ (*1814-10-15 - †1841-07-27).*

Arg-356-1908 (2013-12-12
22:16:00)

Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi poem-tradukon en <http://www.winter-zeulenroda.de/webseiten/lermontov.htm>. Vidu ankaŭ la retejon <http://otvety.google.ru/otvety/thread?tid=6b82c0f69fbac986>. Pri la poeto Lermontov vidu la retejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Михаил_Лермонтов. La rusa titolo signifas: El Goethe. La poemo estas de M. Lermontov libere tradukita en la rusan. Ĝi estas konata en Rusio laŭ tiu ĉi titolo.